XXVIII ORDINARA TEMPO – 9an de oktobro 2011

Ĉiujn ajn, kiujn vi trovos, invitu al la nupta festo – Komento al evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt 22,1-14

En tiu tempo, aludante precipe al la ĉefpastroj kaj al la pliaĝuloj de la popolo, Jesuo diris per parabolo: «Tia estas la regno de la ĉielo. Iu reĝo pretigis grandan festenon por la nupto de sia filo. Li sendis siajn servistojn por voki la invititojn al la nupta festo, sed ili ne volis veni.

Tiam li sendis aliajn servistojn kun ĉi tiu ordono: "Jen mi pretigis mian festenon; miaj virbovoj kaj grasigitaj brutoj estas jam buĉitaj, kaj ĉio estas preta. Do venu al la nupta festo!". Sed ili ne zorgis pri la reĝo kaj iris, kelkaj al siaj bienoj, aliaj al siaj komercadoj; kaj aliaj kaptis la servistojn de la reĝo, batis kaj mortigis ilin. Tiam la reĝo indignis; li sendis sian militistaron, pereigis tiujn murdintojn kaj forbruligis ilian urbon.

Poste li diris al siaj servistoj: "La nupta festo estas preta, sed la invititoj ne estis indaj veni. Iru do al kruciĝoj de la vojoj, kaj ĉiujn ajn, kiujn vi trovos, invitu al la nupta festo". La servistoj eliris sur la vojojn, kunvenigis ĉiujn, kiujn ili trovis, malbonajn kaj bonajn; kaj tiel la festena salono pleniĝis.

Kiam la reĝo envenis, por rigardi la gastojn, li vidis iun, kiu ne surhavis la festan veston. Tiam li diris al li: "Amiko, kiel vi povis enveni ĉi tien sen nupta vesto?". Sed tiu silentadis. Tiam la reĝo diris al siaj servistoj: "Ligu lin mane kaj piede kaj elĵetu lin en la eksteran mallumon. Tie estos plorado kaj grincado de dentoj". Ĉar multaj estas vokataj, sed malmultaj estas akceptataj».

Jesuo anoncis al la ĉefpastroj, al la pliaĝuloj, al la fariseoj, al la reganta pastra kasto kaj al la religiaj estroj ke estos de ili forprenata la regno de Dio. Nun li klarigas la kialon.

Tion instruas al ni Mateo en la ĉapitro 22, en la unuaj dekkvar versikloj. Jesuo do rekomencas alparoli ilin, tiujn kategoriojn, kaj komparas la regnon de la ĉielo al iu reĝo kiu aranĝas nuptofeston. Jesuo ne komparas la regnon de la ĉieloj al liturgia kunveno, al iu bildo kiu revokas la templon, la liturgiojn, sed al tio kiu estis la plej homeca, ĝoja festo, tiu de la nupto, ĉar en lia regno la karakterizo estas la ĝojo, la feliĉo.

Dio deziras la feliĉon de la homoj. Kaj tiu nupto estas de lia filo. Li sendas la servistojn alvoki la invititajn personojn, sed tiuj ne volas veni. Jesuo substrekas la obstinan rifuzon flanke de tiu reganta pastra kasto, de la religiaj estroj, de la invito al la novaĵo de li proponata. La reĝo ne senkuraĝiĝas, li sendas aliajn servistojn.

La servistoj estas la bildo de la profetoj kiujn Dio nelacigeble sendadis al sia popolo, kaj daŭrigas klopodante ilin allogi per tiu kiu estis la plej simpatia kaj interesa parto de la festo, plengusta manĝo. "*Mi pretigis mian festenon; miaj virbovoj kaj grasigitaj brutoj estas jam buĉitaj, kaj ĉio estas preta.*"

Do li ilin altiras per la plej alloga flanko de la festo. Nu, la respondo estas ke *"ili ne zorgis pri la reĝo kaj iris, kelkaj al siaj bienoj, aliaj al siaj komercadoj".* Jesuo substrekas ankoraŭfoje ke la rifuzo flanke de la religiaj aŭtoritatuloj kaj de la spiritaj gvidantoj de la popolo de lia propono de novaĵo de la regno, ŝuldiĝas al la ununura Dio en kiu ili kredas, la ununura Dio kiun ili adoras: la intereso, la avantaĝo. Ĉio kion ili faras estas je propra avantaĝo, la bono de la popolo ne interesas ilin, kaj do al la propono de la regno ili preferas propran kampon, proprajn negocojn, proprajn interesojn kaj ne la bezonojn de la personoj.

Kaj Jesuo ilin admonas dirante ke ilia intereso estos ĉiam tiu kiu poste kondukos al la ruino la tutan popolon. Sed ne nur, "*kaptis la servistojn de la reĝo, batis kaj mortigis ilin"*, la sorto de la profetoj senditaj de Dio, kiuj estas ĉiam malaprezataj, rifuzataj kaj persekutataj de la religiaj aŭtoritatuloj. La reago de la reĝo estas tiu klasika de la Malnova Testamento per kiu manifestiĝis la kolero de Dio kontraŭ la malamikoj, tio estas la detruado de la urbo. Kaj ĉi tie estas iu aludo al la detruo de Jerusalemo,

urbo kiu estos perdita, kiu estos detruita ĝuste pro la religiaj estroj kiuj rifuzis la mesion de paco anoncitan de Jesuo.

Nu la konsekvenco de la parabolo estas ke tiu ĉi regno, tiu ĉi nuptofesto rifuzita de la pastraj ĉefoj kaj kasto, estos nun malfermata al ĉiuj. Fakte «*Poste li diris al siaj servistoj: "La nupta festo estas preta, sed la invititoj ne estis indaj veni. Iru do al kruciĝoj de la vojoj*", jen ĉi tie estas iu vorto erare tradukita per "kruciĝoj de la vojoj"».

Ne estas tiel. La vorto uzata de la evangeliisto estas grava. Li utiligas la grekan vorton kiu indikas la finon de la urbaj stratoj, tie kie komenciĝas la padoj. La servistoj do devas eliri de la urbo kaj atingi la limojn de la regno. La anonco de la regno jam ne estas nur por la urbo, sed estas ĉie. Do ili devas eliri de la urbo kaj iradi laŭ la padoj de la mondo.

Tio estas la invito kiun Jesuo faras. Kaj ĉiuj estas invitataj al tiu nuptofesto. La amopropono de Dio estas por la tuta homaro.

«*La servistoj eliris sur la vojojn, kunvenigis ĉiujn, kiujn ili trovis, malbonajn kaj bonajn*», unue la malbonajn kaj poste la bonajn. Tio kongruas kun tio kion Jesuo diris pri la amo de la Patro: "vi estos filoj de via Patro kiu levas sian sunon super la malbonaj kaj la bonaj", do ne estas unue la bonaj kaj poste la malbonaj, sed ĉiuj estas invitataj. La ampropono de Dio estas por ĉiuj, precipe por tiuj kiuj pleje ĝin bezonas.

«*Kaj tiel la festena salono pleniĝis. Kiam la reĝo envenis, por rigardi la gastojn, li vidis iun, kiu ne surhavis la festan veston*». Kiu estas la signifo de tiu nupta vesto? Helpas nin la libro de Apokalipso en kiu oni parolas pri la nupto de la ŝafido kaj legeblas ke la lina vesto estas la agadoj de la sanktuloj. La invito partopreni al la regno estas por ĉiuj, tion ni ja diris, sed post eniro en tiun regnon, estas bezonata la konvertiĝo, ŝanĝo de pensmaniero kiu devas esti videbla en la agadoj.

Kaj ĉi tie male estas iu kiu tiun ŝanĝon, tiun konvertiĝon ne faris. «*Tiam li diris al li: "Amiko"».* Tri fojojn aperas la vorto "amiko" en la evangelio de Mateo kaj ĉiam ĝi estas en negativa senco; al la enviema laboristo en la parabolo de la vitlaboristoj, al Judaso kaj ankoraŭ ĉi tie. "*kiel vi povis enveni ĉi tien sen nupta vesto?".*

En la regno de Dio la kondiĉo por partopreni estas la konvertiĝo. Jesuo tion jam diris: "Konvertiĝu ĉar proksimas la regno de Dio". Konvertiĝo signifas anstataŭigi la ekzistantajn valorojn per tiuj proponataj de Jesuo. La regno de Dio estas altenativo por la socio kie anstataŭ akumulado estu kundividado, kie anstataŭ ordonado estu servado. Kaj tion oni devas vidi per konkretaj agadoj kiuj tion evidentigu.

«*Sed tiu silentadis. Tiam la reĝo diris al siaj servistoj: "Ligu lin mane kaj piede kaj elĵetu lin en la eksteran mallumon. Tie estos plorado kaj grincado de dentoj*"». Tio estas tipa bildo prenata el la biblia lingvaĵo, el la rabena lingvaĵo, por indiki la fiaskon de propra ekzistado. La religiaj ĉefoj, la ĉefpastroj, la pliaĝuloj, la fariseoj, tiuj kiuj opiniis sin la plej proksimaj al Dio, la privilegiitaj de la regno, ĝuste ili male ne eniris ĝin, estis ekskluditaj. Ilia ekskludado ne estas la fino de la projekto de amo por la homaro, sed ĝi ebligas etendiĝi kaj sin adresi al la tuta universo.

«*Ĉar multaj estas vokataj*», la ampropono estas por ĉiuj,«*sed malmultaj estas akceptataj*», estas malmultaj tiuj kiuj respondas jese, ĉar por respondi jese necesas vivoŝanĝo kiu sin montras plene en agadoj kiuj riĉigu la vivon de la aliaj, agadoj favoraj al la bono de la homo. La konvertiĝo signifas meti la bonon de la homo kiel plej gravan punkton de sia ekzisto, kiel absolutan valoron.

Pro tio la religiaj aŭtoritatuloj estas ekskluditaj, ĉar por ili la plej grava bono estas la ilia kaj tiu de la institucio kiun ili prezidas kaj defendas.